


Ĉiespejo

QV62156 WYPO

n-ro LX
"SEVILA FANZINO"

VERKITA EN LA PLEJ BONGUSTA LANGVO. JES, LANGVO!




LA MALBENO DE L' FARRONOJ

- PLIA FIRAPORTO PRI KONGRESO
- KIEL NOMI NIAN URBON ?
- ĈIO PRI LA HISPANAJ E-GRUPOJ

- CENTRA KOLEKTENDA AFIŜO
- SENPRECEDENCAJ TRADUKOJ
- PLAGIATITA KOMIKSO

Ĉiesrevuino
N-ro 4
Aŭtuno-85



Eldonas:

SEJO

(PAGO 210 EN JARLIBRO)

Pozo, 3
E-41003
SEVILLA

LA ĈEFKUNMEDIANTO

KABEIS

ĈEFSENHONTULOJ

Pako la tria
Ed' Blond'
Alĉjo

KUNLABORANTOJ

A.K.E.N.V. de S.E.A.
D-rino Inge Kacmann
Manolo la dua
Ĉefo de nia spiona servo
Fotisto: Vidul' Abirdet'
La Koboldo de l'kongresejo

PROTAGONISTOJ

Tutanĥamon
Borboljo la unua (dufoje)
Alfonso Milito
Botha
Andreo, Ĉemo kaj Cabezos ree
Kordovaninoj
Niaj grupoj

Kordovanino en Sevillo
vidante ĉiesrevuinon ekdiris:
"Ĉu tio estas **putina** revuo?"
"Jes," oni respondis,
"ĝi estas **via** revuo".

(Adaptaĵo de la limeriko
de Andreo Sid'orth far
Kolektivo mi)

Leteroj al Ĉ-R

Karaj redaktoroj:

Kian ĝuon mi spertis trafoliu
mante vian lastan numeron aperigi-
tan! Kiel mi povintus nenion scii
pri ĝi ĝis nun? Vian gazeton mi tr
ovis bela, ĉarma, instruiga kaj se
kse plaĉa. Ĝin legante, mia koro ba
tis je esperantomovada ritmo; miaj
okuloj verŝis glorajn larmojn sur
la paĝojn de via tiom fikiga revuo.

Ĉu vi povos sendi al mi urĝe
ĉiujn numerojn publikigitajn kaj pu
blikigitajn? Mi profitas la okazon
por gratuli plene elkore la panjojn
de la ĉiesrevuinofarantoj. Antaŭdan
kon. Poŝtĝiro sekvas.

Hèctor Alòs i Font
(Sant Cugat del Vallès)

N. de la R.: Ni ricevis vian
monon, per kiu vi ricevos kvazaŭe-
ternan abonon. Dankon kaj dankon.
Viaj vortoj vivigas nian kacoplenan
senton.

La trokonata malbeno

Kiam faraonoj mortis, laŭ isia moro, ĉiam pretigis ilojn por protekti isin kontraŭ la sakrilegiistoj. Unu el tiuj iloj estis la malbeno, uzita en multaj tombejoj el Egiptujo. Mi rakontos historion certe, eble... ĉu?, konata de vi.

Tiu historio temas pri du sinjoroj: Howard Carter kaj Lord Carnarvon. La unua estis profesia sciencisto, fakulo arkeologa, tre laborema kaj serioza pri sia laboro. Lin konis la alia, tiu anglo, kiu estas bonega ekzemplo de la nomata "gentleman" (traduku pli-malpli "dandulo").

Pro malsano ĉe spiraparato por li estis tute neelteneblaj anglaj vintroj, do li ĉiam nepre devis iri plivarmajn landojn. Iam; mi pensas, ke eble pro hazardo; li iris Egiptujon; li interesiĝis pri arkeologiaj aferoj, kaj post ol paroli kun Howard ili pretigis isin por malkovri eventualajn tombojn... Estis fruktodonega kunlaboro.

La unua -kaj sola- tombo malkovrita estis tiu de Tutankhamon'. Malkovrita de Lord Carnarvon kaj Howard Carter. Post kelkaj jaroj senlace laborante ili vidis la tombejon. Tiu unua ulo, kiu eniris kaj vidis ĝin estis la "dandulo"; la alia demandis: "kion vi vidas?"; la nura respondo: "MIRINDAĴOJN".

La novaĵo estis publikigata en multaj ĵurnaloj tra la tuta mondo; la malkovro estis pli grava ol iu ajn alia dum la tuta homa historio. La antikvaj egiptanoj metis laŭ kutimo ĉe la ĉerkego trezorojn, manĝaĵojn, kaj eĉ srevantojn por helpi la faraonon dum la alia vivo, post la morto. Nu, ĉiam ekzistis sakrilegiistoj, kiuj ŝtelis la trezorojn; sed en ĉi tiu tombo ŝtelistoj ne atingis la ĉambrigon okupitan de Tutankhamon', kaj niaj mikoj atingis tre gravan arkeologian akaron. Sed mi ne rajtas persigi mian rakonton laŭ strangaj vojoj, ĉar mi ankoraŭ devas paroli pri la malbeno.

Kurioze Lord Carnarvon ja estis la unua ulo trafita de la malbenaĵo, se ĝi ekzistas... (la ekzisto ankoraŭ estas diskutita de fakuloj). Estas interesege scii pri liaj lastaj vortoj, kiam pres-

kaj lin mi sekvas". Tuj poste... li mortis.

La kialo de lia morto ankoraŭ ne estas konata, sed pro la sama kialo kaj dum la sama jaro mortis du aliaj arkeologoj.

Poste faliĝis siatomben la usona milionulo George Jay-Gould. Nepre komence de ĉi tiu jarcento kuracistoj ne posedis bonan kuracan instrumentaron, ĉar estas treege strangege la malsano diagnozita de ili: bubonpesto. Kaj tuj poste ne plu vivis la anglo Joel Wolf, entreprenisto, kiu, same kiel la antaŭa sinjoro, de ziris vidi la tutankhamonan tombon, kaj dum la vojaĝo al Britio li estis invadita de strangaj febregoj.

En 1924 la radiologo Archibald Douglas Reed falis pro la influo de l'faraono; li estis, kiu analizis la embalzamigitan korpon de Tutankhamon'. Post lia laboro li iom post iom malvigliĝis. Finfine la finigo iris ĉe li.

Kaj tiama-niere, dum kelkaj jaroj mortis 23 personoj pli-malpli rilatintaj kun la malkovro de la tombejo ĉe la Valo de la Reĝoj.




NIAJ GRUPOJ

La "Boletín" de la Federasion' espanjola de Esperanto" permesis al ni publikigi en nia revuo ĉi sekcion, kiu kutimas aperi en tiu revuo. Jen skizo kun la plej interesaj informoj:

- La grupo KACO KAJ MAMO de Vigo volontarange aranĝos la venontan nacian kongreson.
- La grupo FIKO KAJ SPERMO de Faŝadolido ŝanĝis sian adreson al kadra placo.
- La grupo FRANKECO el Baragozo ankoraŭ torturas kelkajn junulojn sendependemajn.
- VALENCIA SPERMANTO-PUPO ankoraŭ dormas sub la Valencia Luno.
- La grupo KASTRADO-NOVA ankoraŭ plendas pri la fotoj faritaj dumkongrese.
- MERDIDA ESPERANTO-LICEO ne plu akceptos sudafrikanojn.
- KACOLIKA ESPERANTISTA ASOCIO tradukos pliajn verkojn de E. de Balaguer.
- Fine ni sciiĝis, ke MERDOLDO DE ESPERANTO (internacia revuo) ne akceptis publikigi recenzon pri ĉiesrevuino.



Alfonso Milito :
La Koboldo de la registaro.



Nia spiona servo kaptis lorne la promesitan gorbaĉevan raketon en ties vojo. PRETIĜU KONTRAŬMISILO !!!

SEVILO - SEVILJO aŭ SEVILIO

Per ĉi artikolo la redakcio de Ĉ-R kunlabore kun la alta Komitato pri enkonduko de novaj vortoj de Sevilja Esperanto-Akademio (A.K.E.N.V. de S.E.A.) volas fini la polemikon rilatan al la ĝusta nomo de la Giralda Urbo en Esperanto. Fakte tiuj tri nomoj, kiujn pli-malpli ofte oni aŭdas estas ĝustaj, sed ĉiu el ili taŭgas nur por unu difinita kaj malsama signifo. Jen la klarigo:

Vivu Seviljo!

Portas sevilaninoj
en mantilo
surskribon, kiu diras:
Vivu Seviljo!

Vivu Triano!

Vivu triananoj,
Tiuĵ de Triano!
Vivu seviljaninoj
kaj seviljanoj!

Mi jam trapasis
Makarenon kaj ĉie
mi jam trapasis.

Mi jam trapasis,
vizagon kiel la via
ĝis nun mi ne trafis,
Makarenon kaj ĉie
mi jam trapasis.

Ho! Sevilia rivero,
estas tiom belaj
via velaro blanka
kaj branĉoj verdaj.

Sevilikantoj el la
18a jarcento.
(Tradukis Ed' Blond')

SEVILO: La PIV-a signifo estas malĝusta. Tiu vorto uzatas por nomi nur la historian centron de la urbo, tio estas, la urboparton iam ĉirkaŭitan de grandaj defendaj muroj. Ĝi enhavas ĉiujn vidindaĵn monumentojn kaj antikvaĵn konstruaĵojn.

SEVILJO: La kompleta urbo, t. e., la tuta vasta zono, kiun regas la Sevilja Urbodomo. Seviljo do enhavas Sevilon.

SEVILIO: En tiu vorto jam aperas la sufikso -i, kiu laŭ PIV signas landon. Sevilio do estas tio, kion aliaj nomas Andaluzio: la suda provincaro de Hispanio, kiu kuŝas sub la povo kaj influo de la metropolo Seviljo. Tamen "Sevilio" estas vorto kun pli vasta senco ol "Andaluzio", ĉar koncernas ankaŭ Badaĥozon, la mazaronan zonon (Kartagenon, LA MANGON, ktp.), Septon kaj Melliljon (kaj eventuale iom el Algarvo). Ekzemploj: Mi ĵuras per la sevilia rivero^Z. Mi tre ŝatas Tele-Sevilion^A. Ho!, maŭreca Sevilio!^E.

Redakcio de Ĉ-R.
A.K.E.N.V. de S.E.A.



JOZEFO RODRIGezo DE LA BORBOLJO
LA UNUA. (IMPERIESTRO DE SEVILIO).

Mita kvartaleta
de Sankta Kruc'.

Mallarĝaj vojetoj,
kradoj, lanternoj
kaj ĉiela blu',
mita kvartaleta
de Sankta Kruc'.

Fenestroj, floroj,
anguloj, terpotoj
kaj stranga lum',
mita kvartaleta
de Sankta Kruc'.

Vitolaŭba ombro
en sakstrat'.

Alkazaro, petro,
akvo, hedero,
ankaŭ kantaĵ',
vitolaŭba ombro
en sakstrat'.

Portikoj, kortoj,
geranioj, rozoj
kaj ora flav',
vitolaŭba ombro
en sakstrat'.

Kortoj de standardoj
'stas ama nest'.

Fontoj, keneloj
orangoj, ĉenoj
granda pordeg'
kortoj de standardoj
'stas ama nest'.

Pincinoj, reĝoj,
lordoj, nobeloj
kaj korá rev',
kortoj de standardoj
'stas ama nest'.

Sankta kruca fero
forĝita nigr'.

Poetoj, pentristoj,
kantantoj, artistoj,
kiuj songos vin,
Sankta Kruca fero
forĝita nigr'.

Flirtaĵo, suspiro,
forĝejo, plorkrio,
tipa kantist',
Sankta Kruca fero
forĝita nigr'.

Rekantaĵo:

Kaj amoj,
kaŝitaj ĉe vestibloj
kiuj skribis legendaron
de l'Sud,
mita kvartaleta
de Sankta Kruc'.

tradukis:

La Tradukisto
te. Ed' Blond'.

POEZIA Kaj tipa PAĜO



Tri maŭrulinoj enamigas min
ĉe Jaen'
Aksa kaj Fátima kaj Marien'.

Tri maŭrulinoj tre ĝentilaj
iris por pluki olivojn
kaj jam estis plukitaj
ĉe Jaen' :
Aksa kaj Fátima kaj Marien'.

Kaj jam estis plukitaj
kaj revenis korŝiritaj
kun vizaĝoj senkoloritaj
ĉe Jaen' :
Aksa kaj Fátima kaj Marien'.

Tri maŭrulinoj iris
viglaj por pomojn deŝiri
kaj jam estis deŝiritaj
ĉe Jaen' :
Aksa kaj Fátima kaj Marien'.


Kiu vi `stas, Sinjorinoj,
mian vivon ŝtelistinoj?
Kristanaj, ĝis nun maŭrulinoj
ĉe Jaen' :
Aksa kaj Fátima kaj Marien'.

La maŭrulinoj el Jaeno.
Populara kantaĵo el
la 15a jarcento.
(Tradukis Ed' Blond')




**KIEL
KACLOGA
CI ESTAS,
JOZEFO!**

CERTE PER
ĈI NOVA BILDO
MI REATINGOS
SUKCESON EN
LA VENONTA
BALOTADO !!!
...



NIA PLACIAT-ITA KOMIKSO

TRADUK-ITA KOMIKSO



ULIN' ĈU VI ĜATUS ĈURON?

KIA PORKO VI ESTAS, PAKO!!!



SED... NI NE FARAS TION DE LA PASINTA JARO, KIAM LA TERSEMADO!!

KAJ ĈU VI JAM VOLAS PLIAN, OBSE-DULO.



KOMPRE-NU... MI...

VI ESTAS MALVIRTULO KAJ MALDECUL


IRU KAMPA-REN POR PAŬTI KAJ FRIDIGI VIAN VOLUPTON!!!



SED, NUN PLUVEGAS

DES PLI BONE DO


TIEL LA AKVO TRANK-VILIGOS VIAN KOITEMON



BLAM!

VILĈJO* VI JAM RAJTAS ELIRI. LI JAM PAFIS SIN FOR

KAJ NE BRUFERMU LA PORDON, FIUL'!!



FUI MI PENSIS, KE LI NENIAM FORIRO. KIEL MALKOMFOR-TA MI ESTIS SUBLITE!

SEN LA PERMESO DE FER NEK DE "LA JAŬDO"
* NE AŬLDO!!!

Melissa TARDUCCI

Kiam tagiĝis la 15-an d'aŭgusto en la ĉefurbo de l'suno kaj la ĝojo (andaluzigita: fivilaĝo de l'varmo kaj la mokserco), kiel ĵus dirite, ta ĝiĝinte mi estis preta atendi venontajn horojn da terurao kaj ĉio-okazeblo.

Tamen ĝuste tion mi jam spertadis plurajn monatojn antaŭ la horo "nul", kiam samsortulo de penado (t.e. sango, ŝvito kaj larmoj) palmiene diras: iu sprita ekpensis aranĝi en nia urbo la 3-an andaluzian kongreson de esperanto. Bezonate ne estas klarigi kiajn kiojn tuj audiĝis: ki-?, fek, fik, (pri la cetero la redakcio petas ĉies komprenemo ĉar kiel sciante nia fanzino estas mondkonata kiel "internacia sendependpeka revuo").

Trankviligita mi ne povis ne ekstremita rememorigante la nacian kongreson antaŭ unu jaro okazintan kaj mia rolo tiam kiel kongres-estrarano (ĉi tiu vorto estas difinita en la "Plena Ilustrita vomitaro" jene: "homo senpage laboranta, kies ĉefa trajto estas sia sadomasoĥismeco kaj kiun oni kutimas reĝali pro sia laboremo per insultoj kaj ĉiaj batoj")

Efektive mi spertis ree samajn postenojn kiel oficisto, murafiŝgluisto, intervjuata ĉefulo, financisto altranga (ĉifoje por pruntepreni komputilojn ĉe firmao) kaj jam ĝuste antaŭ la kongres-starto mi rolis kiel oficiala stiristo por transportado de materialo. Se io restus ja mi ankaŭ deĵoris kiel librovendisto, gastiganto (mia vera fako en la nacia kongreso) kaj kompreneble la plej ŝvitiga: kasisto (kion oni tute senhonte enŝovigis min jam post neklarigebla elspizado).

Nun ni superrigardu kelkajn fiaspektojn de l'kongreso:

Aparte koŝmariga estiĝis dum la kongreso la fakto, ke la "aliespropraj-amikoj" (t.e. ŝtelistoj) prienflarus, ĉar libroj tage kaj komputilaparatoj nokte "mort-danĝeris" pro neebla taŭga gardado.

Krom-andaluza partoprenado priplorinda estis; nur kuraĝiĝis valenciano kaj vitoriano (krom la "majstro" en komputado, kiu venis el Madrido subvenciita de l'kongres'). Feliĉe, ke ne alvenis londonano ĉar povintus krei sian horloĝon fruigita, kaj ne nur se temas pri akurateco ĉar se temas pri kongres-program-plenumo mi ĵuras per Zamenhof, ke oni faris tiajn "kion-mi-volu" kaj oni vidis tiajn krokodilajn faŭcojn, ke mi ekpensis kiel estrarano ekesti la unuan ŝtat-renverson en Esperantio.

Kiel jam ĉiujare kutimas okazi en la ĉitiejaj kongresoj iu dispecigis la manlavujon de l'Puto strato (calle Pozo), kie junuloj tranoktas kaj kie ŝajne oni ludas al "divenu kiu estis" (la kongres-monprofito iros rekte tion ripari).

Kiel ĉiujare iu restis "sen groŝo en poŝo" por la ir-bileto.

Kiel ĉiujare iu afable pruntedonis monon (ĉifoje por aranĝi trinkaĵon komunan) kaj poste ĉiuj prifajfis.

Kiel ĉiujare "Tele-sur" (andaluzigita: "tele-Sevilla") elsendis samajn librojn (la krabo kun oraj pinĉiloj kaj la inĝenia hidalgo) kaj senvoĉajn bildojn de la "majstro", kio vere interesis; t.e. aŭskulti e-on.

Tiam okazis plej stranga, kiam la parolistino ŝajnis esti cerbo-lavita de ni "danĝeraj esperantistoj" diranta al tele-spektantoj, ke e-o estus "tiu lingvo iam ĉies parolata".

Mi, la financa koboldo.



Aŭtuna NAGŔO!

Revua panoramo

NI KUTIME RICEVAS JENAJN
REVUOJN:

EL "ELS PAĪSOS ANDALUSOS",
CENAĈERO-n, LA KORDOVA
ESPERANTISTO-n KAJ
GAZETO ANDALUZIA-n, KAJ
EL LA "ŜTAT' HISPANA" (estat
espanyol) NI RICEVAS KATA-
LUNO-n, EL BUTLLETĪ
DE L'ESPERANTO-n KAJ
VALENCIA LUNO-n.



MI MALFERMOS NOVAN SEKCION
POR LA VENONTA REVUO. ĜI ES-
TOS SEKSA KAJ SENTIMENTA
KONSULTEJO. SE VI HAVAS DE-
MANDOJN KAJ PROBLEMOJN ĜENE-
RALE HOMAJN, GEEDZAJN AŬ GE-
FIANĈAJN, BV SKRIBI AL MI:

Inge Kacman
(doktorino en
Psiĥologio)
Pozo, 3

E-41003-SEVI-
LLA
(Hispanio)

ĈI TIO ESTAS
PLI KOMFORTA
OL AŬSKULTI
ANDREON

Mi kaj
Cabezos
iam
venĝos



LETERO EL KAZERNO

Monteto Murjano, la 17an de Februaro, 1986

Saluton, filekuloj!

Ankaŭ pasintsemajne mi estis en Sevilo, sed denove mi ne preferis ĉeesti nian amuzegan kunvenon. Kial? Ĉar mi bezonis masturbiĝi plie. Se mi irus putstraten mi e-mus trabori ĉion perkace traireblan, kaj tio ne estas oportuna spektaklo por vi, kaj se plue paroli pri ĉi afero, zorgu, ke niaj sanideaninoj legu ĉi leteron. Eble iu(j) el iŝi ekkompatas min kaj decidus ĝojigi kaj plezurigi min.

Mi devas riproĉi Antonon, ĉar li multajn konsilojn donis al mi, sed li diris al mi nenion pri la maniero trankviliĝi sekse dum armeservo. Bonvolu demandi de Luizo pri ĉi tio, ĉar li estas la fakulo.

Nu, antaŭ ol forgesi la aferon, mi devas diri al vi, ke mi ricevis leteron el Azcuénaga. Li diras, ke vi ankoraŭ ne reabonis Monaton. Li diris, ke li bonorde ricevis la informojn pri la naskiĝdato de Paŭlo. Mi ricevis ankaŭ informilon pri la HEJS-renkentiĝo. Se oni prokrastigas mian standard-ĵuron mi havos forpermeson tiun semajnon. Tamen mi ne iros Zaragezen, ĉar mi preferas "gardi miajn armilojn" por la somero; vi jam scias: la SAT-kongreso, la SAT-junulfaka kunveno kaj vizito al Katalunio.

Ĉu vi scias ion pri Rosa? Mi ankoraŭ ne ricevis ĉi la promesitan sonbendon de en Lluís Llach; kion vi opinias? (Certe ŝi ĝeniĝis pro nia sonbendo -note de Alberto, kiu kompreneble ne sidis en la letero-).

Kaj se paroli pri sonbendo, Alberto, zorgu pri MIAFRATA KASEDAPARATO, ĉar eble krom seriozmiena li jam estas perfortema, ĉar li sciigis, ke oni destinigis lin al Ferrel. Ha, ha! Kia batego! Serioze: zorgu pri ĝi.

De nun mi parolos pri katalunaĵoj. Mi manĝis unu tagen pasintsemajne tute hazarde kun kelkaj valencianoj, kaj unu el ili, kiun ni nomas "la edziĝinto", diris kasti-lie: "Hodiaŭ ulo diris al mi, ke la valencia devenas de la kataluna; mi ne komprenas kiel povas ekzisti tiel stultaj personoj". Tuj mi respondis kuraĝe, ke mi tute samopi-nias kun tiu ulo. Alia valenciano ("la Gazeto") pravigis min. Ĉi lasta estas, kiu kelkfoje parolas kun mi katalune. Li diras, ke li parolas sudkatalunian dialekton. Ankaŭ li studas filologion. Ni diris al la edziĝinto, ke li estas faŝisto, kaj li tion ne neis. De mi trafis nevole!

Nu, jam alproksimiĝas la hero por nektomanĝi. Mi preferas skribi kaj ne telefoni, ĉar verki estas multe pli bone kaj amuze.

Vi informos min pri tio, kiel marŝas la rilatoj SEJO-GFU (tre malbone -note de Al-berto-). Mi esperas, ke Antono, Johano de Dio kaj Pako la dua perdu siajn antaŭjuĝojn, aŭ almenaŭ pripesi ilin kontraŭ la monaj favoroj, kiujn ni povas ĝui se ni agas ruze.


Mi ne scias, kion plian diri. De mi adiaŭas ĉiujn kace, lekas viajn ĉurovojn kaj piĉojn, kaj kisas viajn pugojn.

Ĝis baldaŭ!

Pako la tria, nun enkazernigita.

Note de la redakcio: Pako la tria promesis al ni artikolon por la serio en NATO-ana lando, sed li tute ne plenumis tiun taskon, ĉar li devis kuri kazernen. De ni, tute ruze kaj sen lia konsento, decidiĝis publikigi ĉi fileteron, kiun li ĵus adresis al ni. Estu tiel.

⇒ ATENTU: S.E.J.O INFORMAS: 11
Se vi aĉetas al ni ekzon de la
FAMILIO DE PASCUAL DURANTE KONTRAŭ
700 pes. NI DONACOS AL VI PER TUTJARA



HOMAJ RATTOT FIKATAJ EN
SUDAFRIKO ANTAŬ LA OKULOT
DE LA "CIVILIZITA" EŬROPO.

BOTHA
EŜAFODEN!!!